

**Provenca
Esperanto-Federacio**

kvaronjara gazeto
121
somero 2020



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

[http://www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°
25-a de septembro 2020**

bonvolu sendi al la supra retadreso

><<>

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la Prezidanto

La manko de aktivecoj en nia regiono, pro la koronaviruso, ĝenis ĉiujn. Por tiuj, kiuj daŭrigis kursojn, ŝajnas al mi, ke la laboro per telefono aŭ reto postulis pli da energio ol la kutimaj kursoj.

Nun mi deziras al vi bonajn someron kaj ripozon ; ni ĉiuj estu pretaj por la venonta septembro, periodo por ĉeesti en forumoj de asocioj, ree organizi kursojn, ktp.

Tre amike.

Pierre Oliva



**Agrablan kaj ripozigan someron
al ĉiuj anoj de la federacio Espéranto-Provence
kaj al ties apogantoj !**

enhavo

2	lastmonataj travivaĵoj kaj Esperanta vivo	6	federacianoj vojaĝis en Esperantujo
4	diversaĵoj	8	humuraĵoj agendo
5	federacianoj esprimas sin	+	reta suplemento pri Reunio

Lastmonataj travivaĵoj kaj Esperanta vivo



Mi foje skribis en nia gazeto pri la malbona situacio de niaj federaciaj kluboj kaj pri mia pesimismo koncerne ties estontecon.

La ĵus travivita viruskrizo ankoraŭ pli endormigis niajn asociojn... sed danke al tiu stranga momento, mi iel iĝis pli optimista.

Kial? Ĉar dum la semajnoj de trudita izoligo, mi vivis preskaŭ ĉiutage en Esperantujo.

Tio komenciĝis per videokuniĝo kun la Marsejla asocio, kiu ebligis al mi babili kun Rosy, Thierry, Marc, Michel, Ruben... kaj eĉ kun Flavie, el Miami!



Mi volis la samon proponi al miaj samideanoj de Hyères kaj organizis du videosesiojn, sed mi rezignis ĉar la komencantoj de mia urbo ne aliĝis, verŝajne pro timo pri lingvaj aŭ teknikaj hezitoj.

Konektiĝis tamen la aliaj kutimaj partoprenantoj de niaj kafejoj, kiuj ne loĝas en Hyères : Maria, Carmen, Christian, Alain, kaj amikino el Correns, Paulette.



Al ili mi konsilis prefere viziti la retejon «Eventa Servo», kie eblis – kaj plu eblas – trovi multajn eblojn babili kun la tuta mondo.

Ĉar jen bona novaĵo: Eventa Servo disponigas ĉiutage liston de ĉiuj planitaj renkontiĝoj virtualaj.
vidu ĉi tie

Mi tiel konektiĝis kun la Brusela Eo-asocio...



kun internacia grupo EsperantoCBTalk...



kun Legoklubo...



Mi ankaŭ partoprenis en la tuta Malferma Tago de la UEA-Centra Oficejo.



Mi povis spekti prelegojn de Mireille Grosjean: «Spertoj pri tradukado-interpretado kaj amuzaj anekdotoj tiurilate», de Marianne Pierquin: «Esperanta mondliteraturo, ĉu mi povas kontribui?», de Lode Van de Velde: «Sin nutri per la naturo», de Amri Wandel: «La koronavirusa pandemio: evoluo kaj implicoj por Esperanto», de la UEA-prezidanto Duncan Charters: «Prezidantaj perspektivoj pri UEA», kaj ankaŭ koncerton de Kjara.



prelego de Mireille Grosjean



... de Marianne Pierquin



... de Lode Van de Velde



... de Amri Wandel

Ĉu mi iam planis ĉeesti tian Malferman Tagon en Roterdamo? Certe ne! Ĉu mi iĝos fidela partoprenanto, se tio denove okazos rete en la estonteco? Certe jes!

Antaŭ nelonge okazis alia tia evento: la Monda Festivalo de Esperanto - MondaFest' 2020, kiu estis virtuale inaŭgurita la 20an de junio.



Kaj nun... kio okazos post la rekomenciĝo de iel pli normala vivo?

La partoprenantoj de la ĉiusemajna internacia renkontiĝo "EsperantoCBTalk" decidis daŭrigi la eventon post la krizfino. Tiel, mi plu partoprenas ĉiuvendre en amikecplena babilado kun samideanoj el diversaj landoj, i.a. Barato, Irano, Israelo, Pollando, Germanujo, Hispanujo, Italujo, Francujo...

Hazardo en la konversacio igis min esti korektanto de la taskoj de «Paŝoj al Plena Posedo», de William Auld, por italino kaj hispano... kaj babilhelpanto en la franca por edzino de hispana esperantisto.

Plie, mi planas ĉeesti rete la Virtualan Esperanto-Konferencon de ILEI, de la 25a ĝis la 31a de julio...

... kaj la Virtualan Kongreson de Esperanto, de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto.



Ĉu mi intencis tion fari reale ĉisomere? Tute ne! Kompreneble, mi kapablas kompreni ĉiujn eblajn negatifaĵojn pri tio: por efektiviĝi tiajn kontaktojn, necesas ja uzi rettelefonon aŭ komputilon... instali aplikaĵojn («apojn», diras la junuloj)... konektiĝi per Skype, Zoom, Jitsi... Jes ja! Ĉu tio estas problemo? Ili estas la nunaj iloj, verŝajne timigaj (diablaj?) por kelkaj, same kiel estis iam timigaj trajno, telefono, televidilo, kamerao..., kiujn nun ĉiuj senprobleme uzas.

Jes, tion mi povas kompreni.

Sed mi komprenas ankaŭ alian aferon: la estonteco de nia movado kuŝas sendube en la uzo de tiaj modernaj iloj. Dum malaperos la klubagado, kiu fakte ne vere ŝanĝiĝis de post la tute unuaj kluboj de la Zamenhofa periodo, aktivos pli kaj pli virtualaj renkontiĝoj, kiuj fojfoje iĝos realaj okaze de staĝoj aŭ kongresoj.

Ĉiukaze, neniam en mia esperantista vivo mi havis la okazon tiom ofte babili (mi ne skribis «balbuti» aŭ «krokodili»!) kun geamikoj el la tuta mondo.

Ĉu mi bone pasigis ambaŭ endomajn monatojn? Ho jes, tutcerte jes!

Diversaĵoj

Kursoj

Iom post iom, ili rekomenciĝis en nia federacio.

La Ciotat: ekde la 4a de junio, la lernantoj denove kuniĝis, sed ekstere.

Marseille: ankaŭ tie ree okazis kursoj, sed en la parko de Palaco Longchamp. Kunvenoj en la Domo de Asocioj denove okazis ĉiuŝaŭde ekde la 11a de junio. Same pri la Lingva kafejo la 1an ĵaŭdon de ĉiu monato.

Le Beausset: neniam vere ĉesis la kursoj, ĉar Nicole kaj Pierre proponis individuajn kontaktojn al siaj lernantoj, rete aŭ telefone.

Saint-Raphaël: ekde la fino de la izolperiodo, kursoj okazis ĉe Denise Loisel.

Hyères: se la hotelo Ibis estos denove malfermita (kio ne estas la kazo ĝis nun), la renkontiĝoj de la venontaj lastaj merkredoj, julia kaj aŭgusta, povos okazi.

Pikniko de la klubo Fréjus - Saint-Raphaël (Christian Castillon)

La 28an de junio, Maritza kaj Vinko tre afable invitis la Provencanojn partopreni la jarfinan kunvenon de la klubo de Saint-Raphaël. Ĝi do okazis en ilia belega kampo-loĝejo de Les Arcs-sur-Argens.

Estis okazo por multaj el ni rompi tiun tedan izoligon kaj retrovi sociajn rilatojn.

Tiuokaze, ni praktikis "Dobble" kaj aliajn sociajn ludojn, ni vizitis tiun grandan kampon, kiu entenas herbajn ebenaĵojn, fruktoĝardenon, legomĝardenon kaj eĉ naturan monteton, ĉio bone prizorgita.

Maritza kaj Vinko ofertis al la partoprenantoj mirindan manĝadon faritan el la ĝardenlegomoj, al kiuj aldoniĝis ĉies kunportaĵoj.

Estis vere agrabla tago!



Bicikla vojaĝo

Nia sportema kaj kuraĝa amiko Alain Rémy sendis la jenan mesaĝon:

"Mi komencos biciklan vojaĝon merkredon, la 1an de julio. Mi vizitos Italion, Slovenion, Aŭstrion, Germanion, Nederlandon, Belgion, Francion (Dunkirko, Kalezo, Bar-le-Duc, Strasburgo), Germanion denove por partopreni en SPEZI (Festivalo de specialaj bicikloj) en Gernersheim (je la 15a kaj 16a de aŭgusto), Francion denove (Oyonnax, Vichy, Liono, Aix, Tulono).

Mi esperas renkonti kelkajn samideanojn sur mia vojo. Mi planas reveni komence de septembro.

Mi ne havis tempon por krei blogon, sed mi skribos kaj metos fotojn sur Vizaĝlibron (oni diras ankaŭ Fejsbukon).

Bona novaĵo

(Renée Triolle)



Antaŭ du jaroj, partoprenantoj de la novembra staĝo mobiliziĝis por kolekti monon cele al operacio de Hadil, trijara knabineto, kiu naskiĝis kun spina bifida. Operacio kostegis (22.000 € + vojaĝoj + restado + kuraciloj + masaĝoj ktp). Okazis i.a. vendado kaj lotumado de pentraĵoj, dank' al la iniciato de Pierre Oliva. Dank' al la malavareco de esperantistoj kaj amikoj, Hadil estis operaciita, sukcese: ŝi povas stari, marŝi, kuri, salti, do vivi "normale". Lastmonate, la dekstra piedo estis operaciita por ke ŝi restu en la ĝusta pozicio.

Jen foto de Hadil en tradicia kostumo de Kabilio, kie ŝi vivas. Denove varmajn dankojn al ĉiuj!

Federacianoj esprimas sin... pri temo aktuala...

Luc Barbulesco (traduko de teksto de François Ruffin)

Se hodiaŭ ni devige restas hejme, se niaj infanoj ne ĝuas la printempon, kulpas ne la kronviruso, sed ilia senkompetenteco. Ĉar al Francio mankas testiloj, spite la semajnojn, la monatojn, dum kiuj niaj estroj povis antaŭvidi la venontan «militon», kaj prepari sin.

Se hodiaŭ forpasas kuracistoj, kulpas ne la kronviruso, sed ilia senkompetenteco. Ĉar en la francaj malsanulejoj, la situacio similas tiun de la tria mondo.

Se morgaŭ mortos infektitoj pro manko de spiraparatoj, kulpos ne la kronviruso, sed ilia nuleco, ĉar jam de longa tempo ili malpliigis la buĝetojn..

Ilia militeca parolado utilas nur por kaŝi ĉi tiun veron: ilian senkompetentecon.

Ni vere ne forgesos. Hodiaŭ, ni suferas ilian senkompetentecon. Morgaŭ ili respondecos pri ĝi.

Christian Castillon

Lingva rimarko

Mia denaska lingvo entenas "seksigitajn nomojn" (ekz.: ŝtono inas kaj ŝtoneto viras...); vi komprenis, mi parolas pri genroj. Tiu interesa lingva specialeco igas esprimojn esti falsaj, eĉ el profesiuloj, kiam iu nova vorto aperas.

Tiujn lastajn monatojn ni povis aŭdi kaj legi pri la vorto "KOVID" aŭ "COVID"... kelkfoje vire, kaj kelkfoje ine (en la franca). Ĉu oni devas diri en la franca "le COVID" aŭ "la COVID"? Oni devas sin demandi, kion signifas "COVID", siglo kreita de la Monda Organizaĵo pri Sano. Sen surprizo, ĝi devenas el la nuntempa imperialisma lingvo (la jankia lingvo):

CO por "Corona" (familio de virusoj)

VI por "Virus" (infekta agento)

D por "Disease" (Malsano)

Tio estas malsano (ina en la franca), oni do devas diri "la COVID" (konfirmata de la Franca akademio).

Interesas rimarki pri la angla lingvo (tre uzata de la Monda Organizaĵo pri Sano), ke Usono ĵus disigis el tiu organismo... same kiel faris la Unuiĝinta Reĝlando el la Eŭropa Unio.

Jean-François Cousineau

Suite à des recherches sur Wikipedio, je viens de découvrir que l'Académie d'espéranto accepte les deux orthographes «koron-viruso» et «kronviruso» pour désigner le virus responsable du Kovid-19 (Kovim-19).

Comment peut-on accepter deux concepts différents pour une seule et même chose ? Les scientifiques l'ont appelé «corona» (esp. «korono») par rapport à sa ressemblance à la couronne solaire, et non à «crown» (esp. «krono») qui renvoie, entre autre, à la couronne royale.

Le français n'ayant qu'un seul mot, «couronne», pour illustrer ces deux concepts différents, cela voudrait-il dire que l'Académie serait gangrenée par l'influence française, au point de perdre l'essence même de l'espéranto : un concept = une racine ? On pourrait le croire, si l'on n'avait toutefois pas présent à l'esprit que, contrairement à l'Académie française, l'Académie d'espéranto n'avait pas à se prononcer sur le mot lui-même (c'est l'usage qui le définit), mais uniquement sur sa conformité avec le Fundamento, (ce qui est le cas des deux racines citées plus haut).

Quoi qu'il en soit, en dehors des textes rédigés par des francophones, il semblerait que la majorité des articles sur ce sujet utilisent la racine «koron-», telle que «choisie» par les scientifiques (voir notamment le numéro 296 de Kontakto).

PS. L'Académie française n'est pas en reste, puisqu'elle vient en effet de décider que la terminologie «Covid-19» (qui désigne la maladie développée par le coronavirus) est du genre féminin, s'agissant de la maladie, qui est un mot... féminin, alors que depuis son apparition, tous les francophones (y compris les médias) parlent du Covid-19 et non de la Covid-19... Qui va l'emporter : l'usage (masculin) ou la décision de l'Académie (féminin) ? (en anglais «covi» = abréviation pour corona-virus, «d» = initiale de disease qui signifie maladie, «-19» = l'année de sa découverte : 2019).

A ce sujet, il est agréable de constater que, dès le début, la communauté espérantophone a - fort logiquement - substitué la terminologie «Kovim-19» (KORONVirusoMalsano) à «Kovid-19» (CORONVirusoDisease), le français ayant quant à lui conservé l'orthographe anglaise. Notons, au passage, qu'en espéranto c'est la racine «koronavirus-» qui a été choisie pour l'acronyme «Kovim-19» (et non «kron-virus-» , qui aurait donné «Krovim-19», que l'on ne trouve nulle part, du moins à ma connaissance.

ndlr: Pour les lecteurs intéressés, voir l'article de JFC sur ce sujet dans la revue Espéranto-Info (n°143).

Izoligo

Estas tempo por ekkonscii, ke Damo Naturo, nia patrino, KOLEREGAS pro siaj neelteneblaj infanoj,
kiuj senĉese ĝin turmentas, ĝin venenas.

Do, ĝi devis nin kruele puni, kaj batregali, almenaŭ averti : «Tiel daŭrigu, kaj vi mortos!»

Post periodo de konsterno kaj angoro, venas tempo de silento kaj cerbumado.

Tiam l' izoligo malfermigas la fenestrojn, konatigas najbarojn.

El siaj balkonoj, la infanoj interŝanĝas ridetojn, kanzonojn, afiŝas siajn pentraĵojn.

En la leterkatolojn de la domegoj, ili metas mesaĝojn, desegnojn.

El siaj balkonoj, muzikistoj organizas koncertojn.

Vespere oni aplaŭdas tiujn, kiuj anonime zorgas pri familianoj kaj najbaroj, amikoj.

L'izoligo ebligas disdividi angorojn kaj esperojn, zorgi pri parencoj, najbaroj, amikoj,

sendi mesaĝojn de kompato, kuraĝigo...

Eble ĝi fortigas la familiajn ligojn, donante tempon al parolo, aŭskulto, respondo al demandoj de la infanoj.

Kune legi, ludi, ŝerci, ridi, kuiri bongustajn pladojn, mem fari aranĝojn en la domo...

Sed post l' izoligo... l' izoliĝo... eble venos alia tempo!

Projekti malpli da kresko, tute malpermesi la uzon de pesticidoj, ĝeneraligi la bionutraĵojn, pli da renovigeblaj energioj, pli da ekologiaj karburaĵoj, kreado de medikamentoj kaj vakcinoj, pli proksima interŝanĝo de varoj,

multipliki partigitajn ĝardenojn sur balkonoj kaj tegmentoj,

instrui al la infanoj kiel ĝardeni, planti arbojn, purigi la planedon.

Kaj tiel konfesi sian kulpon, omaĝi al Damo Naturo per Amo kaj Dankemo.

Tiel estu !

Sed, ĉu ni kapablos venki nian violenton, kiu igas nin sovaĝaj bestoj kaj parazitaj por la planedo?

Ni esperu

Ekzilo

(traduko de "Exil", kanzono verkita de Bernard Lavilliers)

Ĝi min vokas kaj fascinas	Kiam mi kuŝas sur ĝia strando
Ĝi lasis ege for siajn insulojn	Mian lacan korpon de sovaĝulo
La mar'	La mar'

Grandaj tajdoj kaj gravaj ŝippereoj	Ĝi min diras, ke antaŭ mi
Ĝi estas ideo el la aĝkomenco	Aliuloj sian voĉon perdis
La mar'	Sur ter'

Ĝi estas la voĉo de la forpasintoj	Mi aŭskultas ĝian voĉon, ties takton
Sur la ŝeroj post noktiĝo	Kaj la muĝilojn de la kargoŝipoj
La mar'	En aer'

Ĝi trankviligas aŭ timigas	Ĉi kelkajn vortojn por Atlantido
Ĝi havas ĉiajn kolorojn	Kiam la vivo likvas
La mar'	Amare

Iri for de l' mondo kaj de l' aroganteco

Aŭskulti la silenton

Ĉe la mar'

Federacianoj vojaĝis en Esperantujo...

Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva

Malgraŭ la pandemio kaj ĝiaj trudadoj, la 4an de julio, dek samideanoj partoprenis la Ĝeneralan Kunvenon de la asocio "Espéranto-Info" ĉe niaj geamikoj Céline, Monique kaj Francis Bernard, en Lozero.

La pasintan jaron, ni estis 21, sed tamen ĉijare feliĉigis nin rajtigiloj, skribaj kuraĝigoj de forestantoj kaj tri novuloj.

Jam de 18 jaroj, tiu bonvola familio dediĉas sian temp-on por la dulingva gazeto "Esperanto-info", helpata de korektantoj kaj aliaj bonvoluloj. Ili kolektas multajn kaj diversajn informojn pri Esperanto, artikolojn aŭ rakontojn senditajn de abonantoj, ludojn, kanzonojn, prezentadojn de libroj... Ĉiuj ni estas allogataj de la bildstria vortaro pri la Kato, desegnita kaj redaktita de Monique.

Tiu revuo estas trezoro same por komencantoj kiel por pli spertaj legantoj, Ĝi celas ankaŭ la esperanto-ŝatantojn, kiuj malkovras nian lingvon, kaj eble poste lernos ĝin. Ĝi ankaŭ estas valora revuo por esperantaj kluboj, kiuj povas prezenti Esperanton al politikaj aŭ administraj aŭtoritatuloj, danke al la franca versio de la tekstoj.

Ni notis ke regule kaj senpage 26 revuoj estas sendataj al 21 Esperantaj kluboj en Afriko. Same al diversaj kulturaj asocioj kiel AVFRAM (Asocio pri la Estonteco de la Franclingvano – <https://www.francophonie-avenir.com>), en kiu agadas Thierry Saladin por Esperanto, fronte al la anglalingva invado.

305 abonantoj ricevas "Espéranto-Info", iomete malpli ĉijare, sendube pro reta konkurenco. Bedaŭrinde.

Plie, la TTT-ejo de Espéranto-Info, multekosta kaj tempovora por regula nutrado, estos forlasita. Anstataŭe estos paĝoj ĉe Facebook.

Fine, jen kelkaj novaĵoj pri kiuj ni parolis:

- La pomarboj "Esperanto" multiĝas kaj fruktiĝas (kutimaj legantoj komprenos ...)

- Pierre Grollemund, sekretario de "Take Esperanto" prezentis sian kajeron n°5. Ĝi faciligas aliron al arkitekturaj mirindaĵoj; interalie ĉi-foje: Nia Damo de Parizo kaj ĝia renovigo.

Por via plezuro kaj diskonigo de Esperanto, ni incitas vin ekaboni tiun interesan, efikan gazeton «Espéranto-Info». (30 € jare por 5 numeroj)



informoj: «Espéranto-Info»

Les Bories – Col de Coperlac - 48210 Sainte-Enimie
fmbernard@wanadoo.fr

*Kia aspektos la mondo
post la kronviroza epidemio?*





À noter sur votre agenda

En raison de la crise sanitaire toujours d'actualité et de la possibilité d'une deuxième vague d'attaque virale accompagnée d'une nouvelle période de confinement, les dates indiquées ci-dessous ne le sont qu'à titre indicatif.

dans notre fédération

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes
4 square Stalingrad, 13001 Marseille

dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare
45 rue Edith Cavell (face à la gare)

forums des associations

septembre 6 - Fréjus

septembre 12 - La Ciotat

septembre 27 - Marseille

Vivacité - Parc Borély, de 10h à 17h

novembre 28-29 - Le Beausset

Fin de semaine culturelle (*à confirmer*)
(bulletin d'adhésion joint au n° d'octobre)

2021 - février 27 / mars 6 - Les Issambres

MES (Mediterranea Esperanto-Semajno)
(bulletin d'adhésion joint au n° d'octobre)

2021 - février 28 - Les Issambres

Résidence Vacancier - à partir de 14 h
Assemblée Générale d'Espéranto-Provence

en France

Baugé (49) - Château de Grésillon

juillet 27 / août 27 - riche programme d'été
avec entre autres la Semaine Verte de Naturisme,
du 27 au 31 juillet, organisée par INOE et la FFN,
à laquelle participeront plusieurs espérantistes de
notre fédération.

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

août 24-28 - promenade dans la nature et Wikipedia

<http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

septembre 12 - Paris : A. G. d'Espéranto-France - 14 h

Maison de la Vie Associative et Citoyenne du Marais
5 rue Perrée 75003 Paris

<https://esperanto-france.org/>

sur Internet

juin 20 / septembre 20 - MondaFest'

en remplacement du Congrès Universel de Montréal,
annulé

<https://mondafest.net/>

<https://eventaservo.org/e/mondafest2020>

Transmaraj novaĵoj el la fora Reunio

Maggy kaj Philippe Combot

Cirkoj en Reunio

Ekzistas tri cirkoj en Reunio.

Ni ne parolas pri la cirkoj, kie, sub tendego, petolas klaŭnoj kaj saltadas akrobatoj.

En Reunio la cirkoj estas vastaj lokoj relative ebenaj, altaj je pli ol 1000 metroj, kiujn ronde ĉirkaŭas krutaj montoj.

La tri cirkoj nomiĝas Salazie, Mafate kaj Cilaos.

Ĉiu el ili havas siajn apartaĵojn.

Por iri al Salazie per aŭto estas nur unu vojo, kiu pasas inter apikaj deklivoj. Preter la vojo videblas fama akvofalo, plurajn dekojn da metroj alta, kiu nomiĝas «la vualoj de la junedzino». Ĉe la piedo de tiu kaskado, la abunda akvo ebligas la kulturon de kreso.



"vualo"

Poste oni alvenas al la tre bela vilaĝo Hell-bourg, kun multaj tipe kreolaj domoj. Tiu vilaĝo apartenas al la oficiale «plej belaj vilaĝoj de Francio».

Neniu vojo kondukas al Mafate! Oni devas piediri por iri tien. Tamen estas pluraj vilaĝetoj tie, lernejo kaj preĝejo. Sed estas neniu aŭto, la stratojn kovras herbo, regas silento kaj trankvilo. Oni povas, post longa paŝado laŭ la padoj, atingi tiun lokon kaj trankvili. La necesojn de la moderna vivo oni venigas per helikoptero.

Kaj la leterportisto devas havi bonajn kruojn. Ekzistas fama kanzono pri [la leterportisto de Mafate](#). Ni piediris tien du fojojn. La duan fojon ni bezonis ok horojn, iren-revenen, en unu tago. Laciga sperto, sed tre bela vojo.



Mafate

Al la tria cirko Cilaos kondukas fama vojo kun cent sinuoj. Ni ĵus trapasis unu semajnon tie. Ni promenis tra la kampoj de lentoj. La kulturistoj uzas ĉiujn rimedojn por fortimigi la birdojn: ili plantis birdotimigilojn, ili etendis ŝnurojn super la kampoj de unu monteto al alia, kaj ĉe la ŝnuroj ili pendigis ladboteletojn. Ili de tempo al tempo skuas la ŝnuron kaj la tuta kamparo sonoras je la tintado de la ladboteloj. Ili uzas ankaŭ petardojn. Kaj estas viroj, kiuj dum la tuta tago staras apud la kampoj por fari bruon kaj forpeli la birdojn.



Cilaos

En Cilaos estas publika banejo, ĉar estas fonto de varma akvo. Antaŭ 1932 la riĉuloj, por veni al tiuj banejoj, pagis fortajn virojn por porti ilin per portoseĝo. Ĉar en tiu tempo ne ekzistis vojo krom tiu «pado de la portistoj», kiu ankoraŭ parte ekzistas.

La pejzaĝoj en Reunio estas tre diversaj. En la cirkoj oni sentas sin preskaŭ en Alpoj: profundaj valoj, multaj rojoj, arbaroj de pinarboj, sed neniom da neĝo, kaj ie-tie bananujoj!



*domo
en Cilaos*